

# AVANCO

## 3/99

Septembro-December  
(XI-a jaro, Nro. 2)

Oficiala Organo de Kuba Esperanto-Asocio

### KEA-ACNU: Daŭra kunlaboro



**Konkursoj!**

Vd. paĝon 9

## Estimataj:

La antaŭa numero de Avanco devis alfronti, plus la jam cititajn problemojn, gravan neseriozecon flanke de la presisto. Tio devigis nian Sekretariinon pri Financoj trakuri tutan Havanon serĉe de pli fidinda presejo. Do, tiun numeron rigardu kiel atestilon pri la (preskaŭ neniam prenita en konsideron) silenta kaj sindediĉa laboro de nia grumblema sed ja bonkora kasistino...

Sekve de peto flanke de kelkaj samideanoj, ĉi-numere ni prezentas novan rubrikon, La Angulo de Duboj, kiu espereble interesos al Vi ĉiuj.

Via Redaktoro,  
Lic. Alberto García Fumero



## NACIA ESTRARO

**\*Maritza Gutiérrez González**  
Prez.. Atentas plenumon de  
ĉiuj taskoj kaj fakoj.

**\*Juan Ramón Rodríguez Gómez**  
Ĝenerala Sekr.. Kontrolas  
internan agadon./Historio, Ameriko,  
Avanco, La Noktuo kaj Universo

**\*Martha Alonso Gutiérrez**  
Financoj./Resp.pri administraj aferoj

**\*Alberto García Fumero**  
Informado./Hejmpaĝo

**\*Pedro Fernández Rodríguez**  
Kulturo. Zorgas pri artaj k.  
klerigaj aranĝoj./Biblioteko

**\*Héctor Jiménez Batista**  
Instruado k. ILEI-Sekcio.

**\*Manuel Rodríguez Rábago**  
Internaciaj kaj Publikaj Rilatoj.

Komisiitoj


**\*Roberto Torres Alvarez**  
Atento al alilandaj e-istoj.

**\*Juan Lázaro Besada Toledo**  
Atento al verkistoj.

**\*Carmen A. Hernández Socarrás**  
Faka Agado

XI-a jaro, nro.2 3/99, (sep.-dec.) Aperas 3 foje jare (aprilo, aŭgusto kaj decembro) / Eldonas: Kuba Esperanto-Asocio / PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo / Telefonnumeroj: 401364 kaj 404484 / Fakso: 53 7 33 8729 / Retadreso: kubesp@ip.etcসা.сu / Ĉefredaktoro: Alberto García Fumero / Revizio k. korektado: Maritza Gutiérrez / Komputila kaj grafika aranĝo: Roberto Molina Gálvez / Prezo: 1:00 CU 15 (enl.), 2.00 NLG aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaj al KEA-konto ĉe UEA: keaux-u / Ĉiuj rajtoj rezervitaj / Reproduktado permesata (indiki fonton k. sendi 2 ekz. al la Redakcio).

☞ KEA-ACNU: Daŭra kunlaboro	3
<i>La Redaktoro</i>	
☞ En la urbo de la amforoj	6
<i>Maritza Gutiérrez</i>	
☞ Sciu	8
<i>La Redaktoro</i>	
☞ Korespondi deziras	10
☞ La Angulo de la Duboj	11
<i>PIVulo</i>	
☞ Ni estis tiel junaj...	12
<i>La Redaktoro</i>	
☞ Denove Nacia Renkontiĝo en Baracoa	14
<i>La Redaktoro</i>	
☞ SAEST 2000 (aliĝilo)	15-16



## **KEA-ACNU: daŭra kunlaboro**

La 8-an de septembro okazis en la sidejo de Kuba Asocio je Unuiĝintaj Nacioj (hispane: ACNU) simpozion kun temo: «la Sistemo de Unuiĝintaj Nacioj kaj Esperanto».

La ambasadoro Eduardo Delgado Bermúdez, Ĝenerala Direktoro de ACNU, laŭdis la laboron farita de Kuba Esperanto-Asocio en kunlaboro kun ACNU kaj prezentis la Ĝeneralan Sekretarion de KEA, kiu prelegis pri la temo.

Ambasadoro Delgado petis kopion de la prelego, kiu faras bilancon je la rilatoj inter UEA kaj la Ligo de Nacioj unue, kaj poste Unuiĝintaj Nacioj, por la Centro de Informado kaj Dokumentado de ACNU. Ekspozicio pri filatelaĵoj esperantaj montrita en la sidejo de ACNU daŭriĝos, laŭ peto, plian semajnon. (N.D.L.R: ankoraŭ novembre ĝi restas!)

Plia ero de la aranĝo estis la stampado de poŝtmarkoj sur kovertoj «je unua tago» omaĝe al la 20-a datreveno de Kuba Esperanto-Asocio. La poŝtmarko estas tiu farita por omaĝi la jarcenton de Eo, kaj la indikoj de la poŝta stampo inkluzivas la tekston « 20 Años -Kuba Esperanto Asocio». La unuan stampadon faris la Prezidantino de Kuba Esperanto-asocio, Maritza Gutiérrez, la duan Cecilia Infante, direktorino de la Eldonejo «José Martí», rilatorgano de KEA al superaj instancoj kaj la trian faris la ambasadoro Delgado mem.

La kuba kantistino Beatriz Márquez petis senkulpigon pro tio, ke neatendita kaj grava problemo devigis ŝin foresti, sed samideanoj Héctor Jiménez kaj Julián Hernández, respektive Sekretario pri Instruado de KEA kaj Prezidanto de la ĉefurba filio, kantigis la ĉeestantojn per «Guantanamera», boleroj kaj originalaj kanzonoj.

Fine de la aranĝo, la prezidantino de Kuba Esperanto-Asocio ricevis, nome de la Asocio, brustinsignon pri la 50-a datreveno de Kuba Asocio je Unuiĝintaj Nacioj. La akompana dokumento rimarkigas la «subtenon kaj partoprenon de KEA» je la laboro de ACNU.

La Redaktoro



Supre: Nia Prezidantino subskribas la koverton.

Sube: Oni stampis la kovertojn per la teksto: "20 años Kuba Esperanto-Asocio"

# En la urbo de la amforoj

Paroli pri urbo de amforoj en Kubo tuj kondukas nin al Camagüey, en la orienta regiono de nia lando. Ĝuste tie okazis Nacia Esperantista renkontiĝo, kies ĉefa celo estas arigi esperantistojn el la tuta lando por kune ĝui la kulturon de la regiono kaj interŝanĝi spertojn pri la agado de la kubaj esperantistoj en diversaj agadkampoj.

La nacia renkontiĝo en Camagüey arigis reprezentantojn el la provincoj Havano, Sancti Spiritus, Villa Clara, Granma kaj Camagüey ekde la 29-a ĝis la 31-a de oktobro. Ankaŭ partoprenis novaj lernantoj kaj plurjaraj aktivuloj el Camagüey, kaj ankaŭ aktive partoprenis S-ro Raúl Juárez Cedeño, unu el la kubaj esperantistoj kiu estas Honora membro kaj de UEA kaj de KEA. Pli ol 20 novlernantoj arigis tie kaj ĝuis la etoson de la renkontiĝo.

Kiel tradicie, okazis interkona vespero en la sidejo de provinca kulturcentro nomata socia rondido Yarabey, kie la diversaj reprezentantoj salutis la ĉeestantojn, faris etan kulturan prezenton kaj laste dancis. La 30-an matene sesiis kunsido por interŝanĝi spertojn pri la temoj edukado kaj kulturo. Jorge Luis Santillán, prezidanto de la provinca filio, raportis pri la agado de la Cmagüey en la eduka kaj kultura kampoj kaj dum inter-

sa interŝanĝo oni emfazis la bezonon pli perfektigi nian instrusistemon surbaze de komunikmetodoj celante paroligi la lernantojn kaj aliflanke, kiel parton de la eduka procezo, krei en la novaj esperantistoj la konscion, ke ili eniras en granda internacia komunumo kaj alproprigi al ili la valorojn de la esperanta kulturo.

La lernantoj mem esprimis sian intereson pri tiu aspekto kaj rimarkigis la strebojn faratajn de la estraranoj en tiu provinco por ĉiam pli perfektigi la instruadon kaj reteni la jam finintojn de la kursoj.

Reprezentantoj de aliaj provincoj ankaŭ priparolis siajn spertojn kaj koincidis pri tio, ke niaj klasoj estu pli komunikivaj. La reprezentanto de Sancti Spiritus, Norberto Díaz, raportis pri ekspresaj kursoj kaj radiolaboro tre aktiva en la



provinco cele al varbado de novaj membroj. Jesús Medrano el Santa Clara raportis pri kursoj okazantaj tie kaj laboro farata en municipo Sagua la Grande flanke de José Luis Montes de Oca, kio sendube estas laŭdindaj streboj por plu aktivigi la filion en la centro de la insulo.

Ĝenerale, temis pri interesa sesio kiu konsistigis fruktodonan dialogon por plibonigo de nia poresperanta laboro.

La kunsido okazis en la Domo de la Heredaĵo kie cetere, la cxeestantoj portis florbukedon al elstara filo de Camagüey, Ignacio Agramonte, kies korpon, jam mortintan, oni lokis sur angulo de la bela domego pasintjarcente antaŭ enterigo, kio ankoraŭ hodiaŭ restas sub mistera haloo.

Raúl Juárez Cedeño solene prelegis pri la historia kaj signifoplena Domo de la Heredaĵo dum la direktorino bonvenigis la reprezentantojn al la Nacia Renkontiĝo.


Posttagmeze, ni translokiĝis al la Domo de Ignacio Agramonte, sur alia urboparto kie okazis kultura programo prezentita de la filio Camagüey kun partopreno de grupo da infanoj kaj junuloj, kiuj kantis kaj deklamis en Esperanto. Samideano Jorge Dumois kantis kanzonon de li verkitan pri Esperanto, lingvo de paco. La provinca filio profitis la okazon por rekoni la laboron faritan de la delegito de la komunumo kaj la direktorino de la kultura instanto de la urbo, kiuj multe subtenis la agadon kaj organizadon de la renkontiĝo. Ili ricevis rekonleterojn de la asocio. Sekve, ni ankaŭ ĝuis kuban muzikon plane luditan de artistino el la provinco, kaj akordeonisto bele ludis kaj akompanis la kulturalan programon. Fine, Julián Hernández el Havano regalis per kantoj la cxeestantojn.

Vespere oni ĝuis koncerton de la provinca koruso kaj gitarludisto prezentis sin en la bela Domo de la Heredaĵo. Sekvamatene, okazis la fermo de la renkontiĝo en la kulturcentro Yarabey, ne solena fermo, sed simpla adiaŭo meze de kantoj, deklamoj kaj dancado.

La Nacia Renkontiĝo en Camagüey sendube estas sukcesa momento por la kuba esperantistaro, kiu havis la okazon renkontiĝi, interparoli kaj travivi Esperantan etoson.

Tiaj eventoj devas pli kaj pli doni la ŝancon por paroli Esperanton, kio ne estis konstanta dum la renkontiĝo; sed tio dependos de ni mem, de nia kapablo pli aktive utiligi la lingvon kaj perfektigi nia lingvolemadon. Ni gratulas la filion Camagüey pro la bona organizado de la renkontiĝo kaj esperas, ke ĝi servos kiel stimulo por ĉiuj, la novaj kaj malnovaj esperantistoj kiuj partoprenis en la renkontiĝo.

Maritza Gutiérrez




### *Verda Brigo*

Samideano kaj Fakdelegito pri gastigado Fernando Paredes, deziras krei klubon de brig-ludantoj. Lia adreso estas: strato Muralla No. 423 Apto 101, Habana 10100, Habana Vieja, Ciudad de La Habana.

### *Omaĝo al Georgina Almanza*



La 30-an de oktobro, aŭtoritatoj el la komunumo, artistoj kaj najbaroj omaĝis al nia elstara aktorino Georgina Almanza pro ŝiaj 50 jaroj da arta vivo. La aranĝon, origine okazonta ĉe la strato "Callejón del Poeta" (Flankstrato de l' Poeto) oni finfine okazigis en la infanteatro "La Tintalla" pro malbona vetero. Ĝin ĉeestis, krom esperantistoj kaj ĝenerala publiko, konataj artistoj kiel ekzemple José Antonio Rodríguez, kiu deklamis, la kantisto Alfredo Martínez kaj Nisia Agüero, direktorino de la Nacia Teatro.



### *Ankoraŭ haveblas moneroj...*

stampitaj memore al la 75-a Universala Kongreso de Esperanto en Havano, kaj eblas aĉeti ilin kontraŭ 5 kubaj pesoj. Interesitoj memoran moneron, bonvolu kontakti al nia Sekretariino pri Financoj. (memkompreneble, ĉu?)

### *...kaj kovertoj kun poŝtmarkoj!*

«je unua tago» stampitaj omaĝe al la 20-a datreveno de Kuba Esperanto-Asocio (Vd. artikolon sur paĝo 4). La poŝtmarko estas tiu farita por omaĝi la jarcenton de Eo, kaj la indikoj de la poŝta stampo inkluzivas la tekston « 20 Años Kuba Esperanto Asocio, 1979 -1999». Interesitoj bonvolu kontakti rekte al KEA.

### *Suffloroj...*

Esperantistoj el Villa Clara havas novan bultenon: «La Fontano». Dum ni atendas ekzempleron...gratulojn!



## *Kontribuoj serĉataj!*

Samideano Pekim Tenório Vaz serĉas du- tri- aŭ kvar-paĝajn artikolojn pri la temo: «Kial mi estas esperantisto aŭ esperantistino» aŭ «Miaj travivaĵoj en Esperantio», por artikolara libro, kies aŭtoroj estos geesperantistoj el diversaj landoj. Biografieto de la aŭtoro (naŝkiĝdato, lando aŭ etno, profesio, literaturo publikigita, landoj vizititaj, intereso, ŝatokupoj, aktivado en Esperantio) akompanu ĉiun verkaĵeton. Kontakti al:

Pekim T. Vaz

Caixa Postal, 182

Belém - Pa

Br - 66017 - 970

Brazilo

Retpoŝto: vazpekim@amazon.com.br



## *Konkursoj!*

Cu Vi scias, kio estas *slogano*? Se ne, kuru al la biblioteko konsulti vortaron aŭ demandi al Via instruisto, ĉar Kuba Esperanto-Asocio kaj *Avanco* lanĉas konkurson pri sloganoj, kompreneble en Esperanto. Ili estu taŭgaj por esti uzataj sur puloveroj, aŭ por afiŝoj. La nomon de la gajninto oni diskonigos dum la aranĝojn honore al la venontjara datreveno de KEA. Proponojn sendu al nia redakcio. Limdato: la 30-an de majo.

La premio?...ho, jes, la premio, jes! Nu, bone, tio estas sekreto ĝis nun...

### *"50 jaroj por Esperanto, Paco, Ĉinio" (Ricevita pere de "Interredaktore")*

En majo de la jaro 2000, la redakcio de El Popola Ĉinio festos sian 50-jaran jubileon. En duonjarcento la revuo EPĈ, la E-movado en Ĉinio kaj la tuta mondo spertis grandajn ŝanĝiĝojn. Vi, spertanto de la 50 jaroj, certe havas ion por verki, por diri al la aliaj. Pro tio ni lanĉos konkurson 50 jaroj por EPĈ kaj sincere petas vian kontribuajhojn.

Vi povas verki kun tre ampleksa temo, rilate al EPĈ --- Esperanto, Paco kaj Ĉinio. Ekz. Viaj esperantista sperto, opinio pri E-movado kaj paco, amikaj kontaktoj kun alilandanoj, impresoj pri kaj rilato kun Ĉinio kaj la revuo EPĈ...


Viaj kontribuoj povas esti en ajnaj stilo kaj formo. Estas tre bonvenaj koncernaj fotoj kaj portreto de la aŭtoro por ilustri la artikolon.

Viaj kontribuajoj povas esti en ajnaj stilo kaj formo. Estas tre bonvenaj koncernaj fotoj kaj portreto de la aŭtoro por ilustri la artikolon.

La kontribuajoj venu al nia redakcio antaŭ la 30-an de aprilo, 2000. Ni aljuĝos premiojn al la kontribuintoj. La premiitoj ricevos ĉinajn metiartaĵojn, E-librojn kaj unu-jaran abonon de EPĈ. Ĉiu kontribuinto ricevos donaceton.

Ni publikigos elstarajn kontribuojn en la rubriko 50 jaroj -- EPĈ. La rezulto de la konkurso legeblas en la julia numero de EPĈ 2000. Dum la 85-a UK en Tel Aviv de Israelo ni anoncos la rezulton kaj disdonos la premiojn.

La redakcio de **EL POPOLA ĈINIO**  
epc@china-report.com



**Korespondi deziras...**

### **Lernejo en Pollando**

Lernantoj kaj instruistoj de Esperanto en pola mezlernejo je la nomo Lukoviko Zamenhof bonvenigas ĉiujn leterojn, precipe tiujn, kiuj enhavas informoj pri E-agado. Leterojn sendu al:

XXX Liceum Ogólnokszta  
im. Ludvika Zamenhófa  
ul. Kruczkowskiego 4  
PL 93-239 LODZ  
Pollando



***Ne estu malmoderna...parolu Esperanton!***

# La Angulo de la Duboj



Kiam bati, kaj kiam frapi?

Jen interesa demando, kiu sendube pensigos pli ol unu esperantiston.

Atentu! Ne temas ĉi tie pri provo estigi kverelon inter esperantistoj, nek pri instigo platigi la nazon al malfeliĉa homa kobajo! Ankaŭ ne pri provo aperi en la ruĝa kroniko de la *Jurnaloj*...

Okazas nur, ke mi dezirus pensigi Vin iomete pri la diferenco inter la du verboj, la du agoj, kiuj ofte estas sendistinge ĉiutage uzataj de ni.

Laŭ PIV, bati estas ektuŝego per rapida movo de mano, piedo aŭ mantenata objekto. Oni rajtas ankaŭ bati, se temas pri trafo per rapidaj ektuŝoj, ordinare por pretigi ion. Ekzemple, Vi povas bati ovojn por fari omleton. Oni ankaŭ povas bati tamburon, ĉar tiukaze la celo estas sonorigi.

Se Vi batas per la pugno la tablon, krom konsistigi modelon je tute neimitinda konduto, vi skue kaj abrupte trafas: jen bona uzado de la verbo bati. Frapo rilatas al ektuŝo per rapida movo de la mano. Tiukaze oni ne pensas pri forto, kvankam per frapo surporda oni ankaŭ povas anonci sin. Tiukaze la celo estas ĝentile sonorigi.


"Bati" pli akcentas la forton; "frapi" pli rilatas al la rapideco de la movo. La diferenco inter ili tute ne estas banala afero, mi certigas al Vi. Vi rajtas frapi pardonon, sed tute ne konsilindas ĝin bati. Oni povus responde bati, frapi kaj kion ajn fari al Vi, kiu ricevos senpagan klarigon pri la diferenco inter la du verboj.

Amike frapu ŝultron de samideano dum esperanta renkontiĝo, sed bonvolu ne bati lin. Se tio ververe bezonatas, provu fari tion ne tro forte. Enbatu najlon en muron; elbatu fajrerojn per martelo. Frapfrazo taŭgas por propagando; balfrazo estos sendube ŝoka afero...

**PIVulo**

## Ni estis tiel junaj...

Tiu cxi estas la titolo de ŝatata televidromano, kiun oni prezentis al la kuba spektantaro antaŭ kelkaj jaroj. En ĝi amikoj el la junaĝo renkontiĝis denove en la matureco kaj rememorigis travivaĵojn. Kaj okazis ankaŭ multaj aliaj aferoj, kompreneble.



Same oni povus nomi la renkontiĝon, kiu, cele al surbendigado de du radioprogramoj memore al la en Kubo unua radioelsendo pri Esperanto, faris la 25-an de novembro 1999 la ĵurnalisto Angel Ferrera, nuntempa respondeculo pri la populara radioprogramo «Formalmente Informal» (Formale neformala) ĉe Radio Havano. Oni elsendos ilin la 15-an kaj la 16-an de decembro, respektive, kaj dum ni atendas, permesu ke Via redaktoro (ĉar la memoro permesas al ni tiajn ludojn) provu raporti pri la afero per ambaŭtempa alrigardo.

### Tiam...

S-ro Ferrera varme akceptis la ideon kaj raporti pri la dudekjariĝo de Kuba Esperanto-Asocio, kaj samtempe omaĝi la memoron de la forpasinta Orlando Castellanos, konata ĵurnalisto, fondinto de la programo, kiu la 12-an de decembro de 1979 intervjuis al samideanoj Andrés Rodríguez, kaj Juan Lázaro Besada, tiutempaj prezidantoj de KEA kaj de la Sekcio pri Instruistoj, respektive.

Tiu historia intervjuo, elsendita la 15-an de decembro, komenciĝis per salutvortoj fare de Andrés, kun posta klarigo de la ĵurnalisto. Per vigla intervjuo al S-roj Rodríguez kaj Besada, la kuba publiko kaj la mondo informiĝis pri la ĵus fondita Kuba Esperanto-Asocio, pri ĝiaj celoj kaj esperoj.

### Nun...

Andrés(duonŝerce): «La tiama eksplodo je entuziasmo pri Esperanto preskaŭ enkrizigis nin pro tio, ke ne estis sufiĉe da instruistoj...tiu etapo estis tre bela, tre esperplena...» Besada: «La unua surprizo estis, ke S-ro Castellanos sufiĉe grava kaj okupita ĵurnalisto, senkondiĉe akceptis nin kaj ĉio fluis samkiel konversacio...li faris rektajn kaj tre inteligentajn demandojn kaj pri Esperanto kaj pri la esperanta medio. Tiu intervjuo permesis al ni konatiĝi kun vigla, serioza kaj profesia radioĵurnalismo, kaj signis la estontajn rilatojn inter la kuba radio kaj Esperanto, kvankam kompreneble neniu el ni pensis tiam pri tio».

### Tiam...

La intervjuon oni elsendis nokte la 15-an de decembro 1979, kaj oni agrable surprizis la ĉefurbajn geesperantistojn partoprenantaj la zamenhoftagan aranĝon per laŭtparolila

disaŭdigo («Ej, oni parolas pri Esperanto!» «Aŭskultu, aŭskultu...»).

### **Nun...**

Dum la intervjuo S-ro Ferrera profitas la okazon informi, ke tiutempe oni festis la 120-an datrevenon de la naskiĝo de Ludoviko Lazaro Zamenhof, kaj do nuntempe temas pri la 140-a datreveno. Samideanoj Rodríguez kaj Besada parolas pri la mondaj atingoj de Esperanto dum tiuj ĉi jaroj. Oni ankaŭ memorigas pri tio, ke la esperantlingvaj elsendojn de Radio Havano oni aŭskultas jam de 11 jarojn.

Dua radioprogramo, samtage surbendigita, permesis al Maritza Gutiérrez kaj Julián Hernández respektive prezidantino kaj eksprezidanto de KEA, kaj Alberto García Fumero, sekretario pri Informado, paroli pri la nuntempaj celoj de la esperantlingva movado en Kubo, kaj pri revoj. La surbendigo kompletigos per fragmentoj el paroladoj dum la Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Havano en 1990. S-ro Ferrera petis, kaj neniu kontraŭis (kompreneble), fini la programon per kantado de nia eksprezidanto Julián.



Side, de maldekestre dekstren:

A. Rodríguez, M-Gutiérrez, A. Ferrera.

Same de maldekestre dekstren, stare:

J.L.Besada, J.Hernández, A.G. Fumero



La senlaca Alejandro pretigas ion...

## Denove Nacia Renkontiĝo en Baracoa

De la 17-a ĝis la 18-a de decembro okazis en la urbo Baracoa la jam tradicia Nacia Renkontiĝo, kun partopreno de 30 esperantistoj el diversaj provincoj.




Post la agrabla Interkona Vespero la 17-an, la renkontiĝo daŭriĝis la 18-an en la Domo de la Komunumo per hispanlingva (ĉar ĝi celis ĝeneralan publikon, ne nur esperantistojn) diskonigo kaj konversacio pri Esperanto, ĝiaj celoj kaj la signifo de la 15-an de decembro por la tuta mondo. Sekvis prezentado de filmo pri la 81-a Universala Kongreso de Esperanto en Prago, kaj poste la Nacia sekretario pri Edukado, S-ro Héctor Jiménez, faris praktikan klason pri la internacia.

Post la paŭzo matenmanĝa en la restoracio "El Caracol" (La Heliko), la partoprenantoj ĝuis agrablan promenadon tra la urbo, serĉe de la vidindaĵoj: muzeo, kirko kie ankoraŭ oni konservas la unusolan postrestantan krucifikson de Kristoforo Kolombo starigitaj dum siaj esplorvojaĝoj, ktp. Oni ankaŭ vizitis la hotelon "El Castillo" (La Kastelo), vidpunkto el kie oni ĝuas ravan pejzaĝon.

Adiaŭa Vespero en la Domo de Kulturo metis finon al la renkontiĝo. Kiel ĉiam inter esperantistoj, brakumoj, larmoj kaj kisoj sigelis promeson denove estonte renkontiĝi en la bela Unua Vilaĝo.

La Redaktoro



Kuba Esperanto-Asocio deziras al Vi ĉiuj

*Feliĉajn Kristnaskon*

*kaj novan jaron!*

# SAEST 2000

Cirkulero 1

marto 1999

## Kuba Esperanto-Asocio

*Per la sciencoj al esperanto... per esperanto al la sciencoj!*

Ni alvokas al **SAEST2000**, la Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, kiun oni provizore proponas okazigi dum du tagoj en la monato majo, 2000.

## Temaro de la Seminario:

- Apliko de Esperanto en ĉiuj sciencaj kaj teknikaj branĉoj.
- Spertoj kaj esploroj rilate al la instruado de la Lingvo Internacia.
- Spertoj kaj esploroj rilate al la denaska dulingveco.
- Esperanto en Medicino kaj Medicino en Esperanto
- Sciencaj kaj Teknikaj prelegoj en la Internacia Lingvo.

## SAEST 2000 SESIOS PER:

1	Prelegoj
2	Afiŝoj
3	Rondtablaj kunsidoj

Ĉiu prelegonto disponos je 20 minutoj.

Tondu kaj enmetu en la koverton

## JES, MI PARTOPRENOS LA SEMINARION SAEST 2000!

FAMILIAJ NOMOJ

---

PERSONAJ NOMOJ

---

PROFESIO/FAKO

---

PRIVATA ADRESO

---

---

---

---

## Kiel aliĝi?

Interesitoj bonvolu pleniĝi kaj sendi la kuponon kune kun resumo de la prelego antaŭ la 30-an de decembro, 1999. La prelegon mem oni sendu antaŭ la 30-an de marto, 2000. Ĝin oni povas sendi tajpita (sur paperfolio je grando 8.5" X 11" ) aŭ en komputildiskedo.

Aliĝokotizo estos \$50.00 (nacia valuto) por kubanoj. Por eksterlandanoj ĝi estos \$50.00 USD. Tamen, estonte ni informos pri oferto inkluzivante aliĝokotizon, por tutsemajna restado kun matenmanĝo kaj kroma manĝo. Limdato: la 30-an de marto, 2000.

## Kien sendi la resumojn?

Prelegojn kaj resumojn oni sendu al:

Kuba Esperanto-Asocio

Scienc-Teknika Sekcio

Strato Vista Alegre 264 inter str. J.B.  
Zayas kaj Luz Caballero.

Havano 10 500 Poŝtkesto 5120

Kubo



## Mi partoprenos per:

*Prelego*       *Afiŝo*       *Ĉeesto*

## Titolo de la prelego aŭ afiŝo:

---

---

---

---

---

## Mi bezonas: (elektu per kruceto)

- Projekciilon por lumbildoj
- Videoaparaton
- Retroprojekciilon
- Aliajn ilojn (Bv. klarigi!)



